

# BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO  
№ 93, Decembro 2017

---



## Feliĉan

### Novan Verdan Jaron!

Karaj samideanoj!

Decembro estas por esperantistoj speciala monato: ni finas la jaron kaj festas la Tagon de Zamenhof. Ni gratulas ĉiujn okaze de la Tago de la Majstro (kaj de Esperanto-libro!), kaj deziras al ĉiuj feliĉon kaj sukcesojn en la nova, 2018-a, jaro. Estu la simbolo de la jaro – hundo – favora al ni, nin ĝi gardu, kaj al malamikoj de Esperanto boju!

*Estraro de REU*

## Garik, gratulojn!

REU-Estraro kore gratulas eminentan esperantiston Georgij Kokolija okaze de lia naskiĝtago (18.12).

Ni sincere dankas Garik-on pro longjara, senlaca, rezultodona laboro pri pretigado kaj eldonado de Rusia Esperanto-Gazeto. Dum 18 jaroj REGo estis vera tribuno de nia movado, interesa kaj alloga, ĉiam atendata en diversaj anguloj de nia vasta lando. Ni esprimas profundan respekton pro sindediĉo kaj elspezo de tempo kaj fortoj por longdaŭra pormovada aktivado.

Sanon, prosperon, novajn atingojn en la vivo!  
Dankon, Garik!



*Estraro de REU*

## La Unua Bulteno pri RET-2018



Laŭ la decido de REU-Estraro Rusiaj Esperanto - Tagoj en la 2018-a jaro okazos en la eksa bieno de negociisto Neburĉilov, nuna ripozejo en pina arbaro ĉe la bordo de la rivero Teza, je kelkaj kilometroj de la antikva urbo Ŝuja en Ivanova provinco.

**Datoj:** 1-8 de julio 2018 jaro.

**Ĉefa temo:** "Generacia stafeto".

La Organiza Komitato estas fondata, pliaj informoj, aliĝilo kaj ĉio cetera sekvos.

### *La Estraro informas*

RUSIA ESPERANTISTA UNIO

PROTOKOLO № 6 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 25. 11. 2017

Voĉdonado: reta

Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova,  
A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

TAGORDO / TEMO

Pri la loko kaj dato de Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-2018).

La Estraro diskutis du proponojn por gastigo de RET-2018.

La unuan varianton proponis Svetlana Smetanina: eksa bieno de negociisto Neburĉilov apud la urbo Ŝuja de Ivanova provinco (Centra Rusio);

la duan proponon prezentis Valentina Zaĥarova: sanatorio rando de la urbo Taganrogo ĉe la Azova maro (Suda Rusio).

DECIDO

1) Elekti por RET-2018 la bazejon de Neburĉilova somerdomo en Ivanova provinco, proponitan de S. Smetanina.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 6;

kontraŭ: 1;

sin detenis: 0.

2) Okazigi RET-2018 en la periodo 01. 07. 2018 – 08.07.2018.

3) Difini la temon "Generacia stafeto" kiel la ĉefan temon de RET-2018.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 7;

kontraŭ: 0;

sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

PROTOKOLO № 7 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 29. 11. 2017

Voĉdonado: reta

Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova,  
A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

TAGORDO / TEMO

Esperantisto de la jaro 2017.

DECIDO

Proklami membron de REU s-inon Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo) “Esperantisto de la jaro 2017” pro elstaraj meritoj en la multjara kaj sukcesa agado en la Urala regiona kaj tutrusia esperantistaj movadoj.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

PROTOKOLO № 8 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 05. 12. 2017

Voĉdonado: reta

Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova,  
A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

TAGORDO / TEMO

Pri la nomumo de REU-komisiito pri kontaktoj kun Komisiono pri Azia-Oceania Esperanto-Movado ( KAOEM ).

DECIDO

- 1) Elekti membron de REU Vasilij Masjagin el Omsko (kandidatigo de M. Ĉertilov) kiel REU-komisiiton pri kontaktoj kun Komisiono pri Azia-Oceania Esperanto-Movado (KAOEM).
- 2) Konforme al la artikolo 3.11 de la Statuto de REU konfirmi la elektitan komisiiton per decido de la sekva 30-a Konferenco de REU.
- 3) Rajtigi V. Masjagin ekplenumi la funkciojn de la komisiito ekde decembro 2017.
- 4) Taski V. Masjagin observi la aferojn de KAOEM kaj informi la Estraron pri gravaj eventoj, en kiuj REU povus partopreni.
- 6) Devigi la komisiiton regule raporti al la Estraro pri kontaktoj kun la sekretario kaj funkciuloj de KAOEM.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 7;

kontraŭ: 0;

sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

PROTOKOLO № 9 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 14. 12. 2017

Voĉdonado: reta

Voĉdonis S. Smetanina, N. Gudskov, M. Ĉertilov, I. Gonĉarova,  
A. Lebedev, A. Mitin, V. Opletajev.

TAGORDO / TEMO

Pri la Komisiono pri eksteraj rilatoj de REU

DECIDO

- 1) Akcepti la prezentitan de M. Ĉertilov provizoran Regularon pri la Komisiono pri eksteraj rilatoj de REU, fonditan de la 28-a Konferenco de REU (Paragrafo 4 de la Decidoj de la

Konferenco, 19.07.2015), kun posta konfirmo de la Regularo per decido de la sekva REU-Konferenco.

2) Aprobi la nunan laborgrupon de la Komisiono pri eksteraj rilatoj de REU en la konsisto: M.Ĉertilov (Balaŝiĥo), V. Seguru (Mitiŝĉi), Je. Zajdman (Jalto), I. Kossey (Germanio) kun definitiva konfirmo de la komisionanoj per decido de la sekva REU-Konferenco.

3) Komisii al M.Ĉertilov gvidi la Komisionon pri eksteraj rilatoj de REU ĝis la sekva Konferenco de REU.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO:

por: 6;

kontraŭ: 0 ;

sin detenis: 1.

Prezidanto de REU: S. Smetanina

Vicprezidanto de REU: N. Gudskov

## REGULARO

### PRI LA KOMISIONO PRI EKSTERAJ RILATOJ (KER) DE REU

1. La Komisiono pri eksteraj rilatoj (KER) de REU estas kreita laŭ decido de la 28-a Konferenco de REU en 2015.

2. Celoj de la agado de KER estas:

kunordigi kaj aktivigi agadon de la rusia esperantista movado rilate al neesperantistaj movadoj, sociaj organizaĵoj, politikaj partioj, ŝtataj instancoj kaj institucioj, universitatoj, akademioj, lernejoj ktp.

3. Taskoj de la agado de KER estas:

a) popularigo de Esperanto kaj ĝiaj idealoj en konkretaj neesperantistaj organizaĵoj;

b) trovo de vojoj por kunlaboro en komunaj sociutilaj projektoj;

c) plialtigo de la prestiĝo de REU kiel socia organizaĵo;

ĉ) esploro de eblecoj por financaj kaj aliaj rimedoj por REU;

d) pli vasta manifestado en Rusio pri utilo de Esperanto por la socio ĝenerale.

4. Manieroj de la agado de KER estas:

a) kontaktado kun diversaj organizaĵoj kaj dialogado kun ili;

b) partopreno en diversaj projektoj, programoj, aranĝoj, eventoj;

c) interesigo de organizaĵoj pri siaj projektoj konformaj al celoj de la organizaĵoj ktp;

ĉ) kunlaboro kun similaj komisionoj aŭ grupoj en aliaj Landaj Asocioj de UEA.

5. La Komisiono agadas laŭ la Statuto de REU kaj leĝoj de Rusia Federacio.

6. Laboron de la Komisiono kunordigas estrarano de REU, kiu mem estas membro la Komisiono.

7. Listo de membroj de la Komisiono estas prezentata de la Estraro kaj akceptata de la Konferenco de REU. Membro de la Komisiono devas esti aktuala membro de REU (individua, aligita aŭ asociita), aŭ aligita laŭ la kategorio "amiko de REU".

8. Inter Konferencoj la Estraro de REU rajtas ŝanĝi la membrkonsiston de la Komisiono, kun posta aprobo de la Konferenco.

### Al la Fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev» (laŭ la stato por 15.12.17) kontribuis:

Valentina Spicina (Volgograd), Dilara Gadirova (Tobolsk), Tatjana Vŝivceva (Miass); Vladimir Opletajev (Surguto); Pjotr Fedosov (Moskvo); Aleksandr Basov (Luberci) - sume – 7000 RUR  
Anonimaj donacoj - sume 1050 RUR: entute – 8050 RUR.

## **Raja Kudrjavceva**

Raja Kudrjavceva (Rafija Jafasova) esperantistiĝis en la jaro 1980 en Samarkando kaj tuj ekaktivis en Uzbekia esperantista movado. En 1994 ŝi transloĝiĝis en Sverdlovskon (Jekaterinburgon) kaj por ĉiam ligis sin kun la loka esperantista agado ne nur en la Urala ĉefurbo sed ankaŭ en la tuta vasta Urala regiono de Rusia Federacio. Ŝiaj organizaj, kolektivigaj kaj inspiraj talentoj kaj kapabloj speciale riveligiĝis en la lastaj dudek jaroj, kiam aktualiĝis novaj kunagadaj laborformoj inter esperantistaj kolektivoj kaj apartaj aktivuloj.

Raja estas unu el la iniciatintoj kaj ĉeforganizantoj de preskaŭ ĉiuj printempaj ural-siberiaj esperantistaj renkontiĝoj EsPrimo (Esperantista primavero), kies senlaca antaŭeniganto kaj zorgema protektanto ŝi estadis dum 15 jaroj. Danke al ŝiaj klopodoj la EsPrimo-partoprenintoj (entute pli ol 500!) havis ŝancon ĉiuprintempe ĝui amikan esperantistan medion kaj alfronti variajn temojn de movada, arta, kulturkleriga enhavoj.

Ŝia aparte preferata elemento estas aprezado de kulturaj valoroj. Krom organizi por jekaterinburgaj esperantistoj kaj gastoj el proksimaj urboj kaj krom gvidi diversajn Esperantajn



programojn, dediĉatajn jen al poeziaj kaj literaturaj temoj, printempaj kaj aŭtunaj kunvenoj jen al tradiciaj Zamenhof-festoj, ŝi konstante venigas samurbajn esperantistojn al muzikaj koncertoj kaj festivaloj aŭ teatraj spektakloj. Multan atenton ŝi dediĉas al pli juna esperantista generacio, konsiderante tion tre grava zorgo kaj agadkampo bezonata por krei vojon al estonteco, por kontinuiigi tradiciojn, por konstrui pontojn inter spertaj kolegoj kaj novaj esperantistoj. Tion celas ankaŭ tre komplikaj el la organiza vidpunkto regionaj Esperantaj studadoj-lingvotrejnadoj en Jekaterinburgo, kiujn volonte partoprenas gastoj el diversaj urboj de Rusio. La iniciatita de Raja Kudrjavceva lingvotrejnado estas tre konvena scenejo por movadaj spertinterŝanĝoj kaj profesinivela metiejo por instruistoj de Esperanto.

Raja Kudrjavceva estas multjara membro de REU. Ŝi apartenas al konstantaj aŭtoroj de “REGo” kaj de “Bulteno de REU”. Ŝiaj mesaĝoj, informaj materialoj

kaj diverstemaj raportaĵoj formas konsiderindan bazon de la tuta informa fluo en la paĝaro “Ural-Siberia esperantista movado” kaj en la dissendolisto de uralaj esperantistoj.

Ankaŭ en ĉi tiu jaro, kiu bedaŭrinde kiel kelkaj lastaj jaroj estas por Raja tre malfacila, ŝi spite al skuaj sortobatoj ne estingis sian elanon de senlaca organizanto kaj faris multon utilan kaj interesan por samurbaj kaj uralaj esperantistoj. Kune kun kelkaj geamikoj ŝi organizis tradiciajn printempan, someran kaj aŭtunan kunvenojn de jekaterinburgaj samideanoj. Apartan atenton ŝi dediĉis al la tuturala reta projekto “Esperanto-130”, kiun ŝi mem iniciatis, kunordigis kaj gvidis ekde printempo ĝis la interurba festa renkontiĝo, organizita de ŝi kaj dediĉita al la 130-jara jubileo de Esperanto. Tri aŭtunaj monatoj plene forprenis ŝiajn tempon kaj fortojn por organizi kaj sukcese okazigi novembre Esperanto-studadon en Jekaterinburgo – jam la trian lingvotrejnadon kun ĉirkaŭ kvardek partoprenintoj el 18 rusiaj urboj! Dum proksimaj tri monatoj Raja kaj ŝiaj kolegininoj estos realigantaj ampleksan tuturalan retan projekton “Fotoj el

mia albumo”, celantan krei arkivon de interesaj fotoj el la vivo de uralaj esperantistoj. La eventoriĉan jubilean jaron kronos la tradicia Zamenhof-festo en Jekaterinburgo, pri kiu Raja havas jam interesajn ideojn kaj al kiu jam estas invitataj geamikoj el uralaj urboj. Fine mi citu alineon el la intervjuo “Tra jaroj fuĝantaj” <http://ural-sib.org/eo/tra-jaroj-fugxantaj-intervjuo-kun-raja-kudrjavceva> “Raja Kudrjavceva apartenas al rara grupo de ekskluzive engaĝitaj esperantistoj, plene kaj senrezerve fidelaj al Esperanto, kies praktika kaj multbranĉa aktivado servas kaj al la lingvo kaj al la progeso de la esperantista movado. Oni kutimas epiteti tiajn homojn per la substantivo “motoro”, komparante ilin kun tiu senlace funkcia ilo, kapabla ne nur transformi jam ekzistantan energion, sed en la samideana medio ankaŭ krei sinergion tiel bezonatan por akceli kunagadon de diversaj homoj, direkti ilin al sukcesigo kaj realigo de samcelaj taskoj.”

Vladimir Opletajev

**Aranĝoj**

## AMO Seminario

*Aktivula Maturigo, temo "Modernigo kaj junigo de E-movado en Rusio"*

**2018-02-20/22**

AMO-Seminario au Aktivula Maturigo kun la temo "Modernigo kaj junigo de E-movado en Rusio"

Inter la 20-a –22-a de februaro 2018 en la bazejo "Jerŝovo", apud la urbo Zvenigorodo en Apudmoskvo okazos la 43-a AMO-Seminario, kiun apogas UEA kaj REU. Vin atendas interesa, riĉenhava, fruktodona programo, en bona etoso. Kontribuoj bonvenas!

Loĝkondiĉoj proponatas en 2-3-lokaj ĉambroj, oportunaĵoj en koridoro. Manĝado 3-foje tage kun senlima aliro al ĉiuj pladoj.

Aliĝkotizo – 500 rbl. Plena partopreno kostas 4490 rbl. Limdato por aliĝo estas la 1 de februaro. Bonvolu anticipi ĝiri aliĝkotizon + antaŭpagon 1000 RUR al la kasisto de REU Aleksandro Lebedev kun indiko "Por AMO".

Por eventualaj alilandanoj estas proponata 3-taga turisma programo kun restado en Moskvo antaŭ la aranĝo.

## **BONVENON AL ĈIUJ!**

Aliĝu ĉe: <http://reu.ru/kalendaro/alighilo/AMO%20Seminario/>

## La 11-a MER kaj la 40-a AMO

La 3-an de decembro okazis la 11-a Moskva Esperantorenkontiĝo, kadre de kiu okazis ankaŭ la unua en Rusio kaj jubilea 40-a AMO-Seminario kun la temo "Publikaj rilatoj kaj Esperanto: tradiciaj amaskomunikiloj, interreto". La sekva, 41-a AMO-Seminario, okazos en Parizo antaŭ la renkontiĝo en la sidejo de Unesko. Detalajn informoj pri



tio, kio estas AMO vidu ĉe <http://aktivulo.net>. Partoprenis 23 esperantistoj el 3 landoj. Kadre de la aranĝo okazis pluraj interesaj prelegoj, prezentadoj kaj komuna kantado de Esperanto-kantoj. Tradicie preskaŭ seninterrompa Esperanto-programo daŭris preskaŭ 9 horojn kaj finiĝis nur malfruvespere. La aranĝon partoprenis ankaŭ konataj en Esperantujo bardoj Mikaelo Bronŝtein kaj Sergeo Straŝnenko, kiuj prezentis riĉan kantan kaj poezian programon.

*Dima Ŝevĉenko*

## **Ekstera agado**

### **Du prelegoj pri Esperanto kadre de scienca konferenco**

La 10 de novembro en Rusia universitato de amikeco inter la popoloj (RUDN) okazis VIII Tutrusia scienc-praktika konferenco “Amaskomunikiloj en la multpolusa mondo: problemoj kaj



perspektivoj” Kadre de la konferenco okazis du priesperantaj prelegoj:

“Spertoj de redaktado de la ĉiumonata internacia revuo en Esperanto kun 110-jara historio en la nuntempaj kondiĉoj” (Anna Striganova), “Apliko de Esperanto en la sociaj retoj en la kondiĉoj de multpolusa

mondo” (Dmitrij Ŝevĉenko).

Tezaj artikoloj de la prelegoj estos publikigitaj en la libro fine de la novembro 2017.

*Dima Ŝevĉenko*

## **ILEI**

### **ILEI -konkurso pri lingvoteknologiaj esplor-laboroj**



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI kunlabore kun la familio La Torre anoncas konkurson pri esplor-laboro en unu el la kampoj, en kiuj laboris la karmemora prezidanto de ILEI, Profesoro Mauro La Torre (1946-2010). En 2011 la Komitato de ILEI elektis Profesoron Mauro La Torre Honora Membro.

La esplor-kampoj estas:

Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj lingvosciencaj pritraktoj;

Interkultura edukado per Esperanto;

Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton;

Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto;

Retaj kursoj pri Esperanto;

Evoluo de la vortrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe.



La kandidato anoncu sian intencon partopreni kaj sian temon ĝis la unua de januaro 2018 al Mireille Grosjean (mirejo.mireille che gmail.com). Tiu anonco estu dokumento proks. unupaĝa kun mencio pri la esplor-kampo elektita (vidu supre), prezento pri la preciza temo (200 ĝis 300 vortoj). Tiu dokumento entenu mallongan prezenton de la kandidato / kandidatino (nomoj, loĝlokoj antaŭaj kaj nuna, aĝo, retadreso), de liaj/ŝiaj antaŭaj studoj kaj esploroj, kaj aktivecoj en ligo kun Esperanto. Reago de ILEI sekvos ĝis la 15-a de januaro.

La ILEI- Estraro kaj la familio La Torre starigos juĝ-komisionon en rilato kun la temo de la esplorkomisiono.

La laboro devas esti nova esploro farota por la Premio.

La esplor-laboro devas esti dokumentita kaj priskribita en raporto de almenaŭ 20 A4-paĝoj, maksimume 30 paĝoj.

La litertipo estas libera, ĝi estu ne tro baroka. La margenoj estu normalaj, mezaj. La interlinia spaco estu 1,5.

La laboraĵo estu transdonita en reta formo al ILEI-prezidanto ĝis la 30-a de aprilo 2018, kaj en papera formo po unu ekzemplero al la familio La Torre, al ILEI kaj al la ĵurio (la kandidato ricevos la stratadresojn de la ricevontoj) (entute kvin ekzempleroj).

La anonco pri la gajninto okazos antaŭ la 30-a de junio 2018. La gajninto devos sendi ok paperajn ekzemplerojn de sia laboraĵo, tio estas po unu, al diversaj gravaj bibliotekoj en la mondo laŭ la programo de ILEI “Ni Savu Niajn Semojn”.

La premio konsistas el sumo de 500 EUR.

ILEI retenas al si la rajton eventuale publikigi la gajnintan raporton.

La premio estis transdonita la unuan fojon en la jaro 2015 okaze de la 48-a ILEI-Konferenco en Oostende, Belgio, kaj anoncita dum la 100-a Universala Kongreso de UEA en Lille, Francujo.

La konkurso okazadas poste ĉiun duan jaron. En ĉiu konkursjaro la premio estos transdonita en la tiujara kongreso de ILEI kaj vaste prezentita en la samjara Universala Kongreso de UEA.

Ekzistas interna regularo inter ILEI kaj la familio La Torre pri la starigo, konsisto kaj laboro de la ĵurio.

*Mireille Grosjean  
Prezidanto de ILEI  
Les Brenets 2017-09-01*

## ***Eventoj***

### **30-jariĝo de la klubo «Lev Tolstoj»**



Zamenhof-tago en la klubo “Lev Tolstoj”, okazinta 11.12, estis dediĉita ne nur al Zamenhof kaj Esperanto-libroj, sed ankaŭ – kaj plejparte – al la 30-jara jubileo de la klubo.

Venis (el Brjansko) la fondinto de la klubo Anatolo Gonĉarov, kiu multe rakontis pri



diversaj etapoj de la kluba vivo, metodoj de kluba laboro. Sonis interesaj rememoroj.  
La etoso estis amikema, gaja kaj tre malstreĉiga. La kunvenon kronis komuna kantado, fotado kaj teumado kun libera babilado

### *Al la 30-jariĝo de la Moskva Esperanto-klubo “Lev Tolstoj”*

Tridek jarojn la klubo funkcias.  
Ĝia lingvo jubilas parole.  
Esperanto per si emocias  
Kaj alvokas bonfide-bonvole.

Esperanto riĉiĝas kaj brilas  
En la lingvomedio aktiva,  
Kaj neniam la klub’ krokodilas,  
Konservante la lingvon plu viva.

Tridek jarojn kuniĝas la klubo  
Esperanto-logatojn fidele,  
Ebligante, sen ombro de dubo,  
Novajn ŝancojn plu vivi pli bele.

Imageblas ne ĉio en rolo  
Gvidi homojn sur voj’ kvazaŭ vana.  
La fondinto de l’ klub Anatolo  
En la klubodankem’ estu sana.



Esperanto en l’artakompanoj  
Vekas kredon je sia prestiĝo.  
Venu al “Lev Tolstoj” novaj anoj,  
Al la esperantista kuniĝo.

Jaroj kuru, impetus aŭ drivu  
Traktu sortojn favore aŭ trete,  
Sed sen velk’ Esperanto plu vivu,  
Kaj la klubo plu vivu bonstate!

*Klara Ilutoviĉ*

### **Peterburga Zamenhof-tago en diplomatia medio**

Profesoro Johannes Haazen estas iniciatinto kaj kunfondinto de la Sankt-Peterburga Esperanto-societo “*Kariljono*” en decembro 2009. Ekde 2010 la societo konstante funkcias en Petro-Paŭla fortreso. Haazen prelegas en ĉiumonataj renkontiĝoj de la societo. Dank’al la klopodoj de Haazen peterburgaj esperantistoj dufoje festis Zamenhof-tagojn en Belga konsulejo. La unuan fojon la 18-an de decembro 2004 la esperantistojn salutis ĝenerala konsulino kaj esperantistino Marie-Louise Vanherk; la duan fojon la 13-an de decembro 2017 salutis nova konsulo s-ro



Hans Timbremont. En la Zamenhof-tago ankaŭ partoprenis reprezentantino el Pollanda Konsulejo.



Post la inaŭguro okazis honorado de personoj, kiuj multajn jarojn dediĉis al Esperanto-kulturo. Unue oni honoris Tatjanan Sorokina-n, la fondinton kaj gvidantinon de muzika ensemblo "Blua Ponto", aperintan antaŭ preskaŭ 30 jaroj; la dua estis Boris Kondratjev pro lia dumviva kompilado de Esperanto-Rusa kaj Rusa-Esperanta vortaroj.

Monpremiojn ricevis fortepianistino

Vera Ĉudinova kaj Vera Kozlova.

Dum la Zamenhof-tago rusan tekston sinsekve esperantigis Oksana Burkina.

Entute en la Zamenhof-tago partoprenis ĉirkaŭ 70 personoj inkluzive muzikantojn el "Blua Ponto" kaj konsulojn de Belgio kaj Pollando.

*Anatolo Sidorov*

## **Brazila esperantisto festis 100-jariĝon de la Rusa revolucio**

Por novembroj festoj al Rusio venis multaj eksterlandaj gastoj. Inter tiuj estis ankaŭ esperantistoj. Kamarado Adrianov Ĵukov, instruisto, la brazilano kun ruseca nomo, vizitis Rusion jam la duan fojon. Li estas verva komunisto, kaj certe ne povis preterlasi la 100-jariĝon de la Granda Oktobra Revolucio. Tamen li estas ankaŭ esperantisto. En Brazilo li estas konata kiel aktiva propagandisto de Esperanto. Por tio li uzas biciklajn marŝojn. Lia biciklo estas ornamata



per esperantistaj flagoj kaj sloganoj. Loka gazetaro plurfoje publikigis lian foton. Ĉi-foje li vizitis Moskvon kaj Sankt-Peterburgon. Kompreneble li faris kontaktojn kun lokaj esperantistoj. Bedaŭrinde pro lia troŝarĝita programo pri festado de 100-jariĝo de la revolucio, li ne havis multe da tempo por esperantistoj, tamen li sukcesis kontakti Mikaelon Ĉertilov en Moskvo kaj en Sankt-Peterburgo li sukcesis kunveni kun mi. Mi kun la amiko venis al la hotelo Dostojevskij, kie li restadis. Ni renkontiĝis kun Adrianov, kiu tre rapide parolis, kio iom ĝenis min, ĉar mi ankoraŭ ne estas fluparolanta en Esperanto. Li donacis al mi brazilan T-ĉemizon, kio estis plezura surprizo. Venis ankaŭ kamaradinoj de Adrianov, kaj ni kune vizitis Ermitaĝon. Laŭvoje en metroo ni daŭre babilis. Poste ni vizitis ekspozicion dediĉitan al 100-jariĝo de la revolucio, kiu estis aranĝita en Ermitaĝo. Mi esperas, ke S-Peterburgo, kiun li insiste nomis nur Leningrado, plaĉis al li.

*Vladimir Levadnij (Sankt-Peterburgo)*

## Retaj aktivaĵoj

Ĉiuj bone scias, ke en la interreta epoko personaj kontaktoj inter homoj iĝas ĉiam pli raraj. Oni ŝatas interkomunikiĝi virtuale, kaj oni ankaŭ ĉiam pli kaj pli preferas esperantumi retumante, ne forlasante hejmon, vaĝi tra la mondo.

Nuntempe abundas diversaj retaj servoj kaj projektoj, kiuj povus esti interesaj por homoj, se ili ne emas aŭ ne havas tempon kaj eblojn ofte viziti klubojn, studrondojn, rekontiĝojn ktp. Interesaj retaj aktivaĵoj povas ne nur vigligi esperantistojn sed ankaŭ perfektigi ilin lingve, aligi ilin al konkretaj komunumoj kun identaj interesoj.

Kion mi povus proponi al uralaj esperantistoj? Vere ne multon, sed ankaŭ tio povas antaŭenigi, aktivigi, kapabligi esperantistojn, fari Esperanton pli ofte uzata lingvo en la reala vivo, ĉar sen konstanta lingvopraktikado neeviteble venos regreso.

1) Verku por la paĝaro “Ural-Siberia esperantista movado”. Vi rajtas mem elekti temojn. Ili ne estu nepre ligitaj kun lingvoj, Esperanto aŭ esperantista agado en la regiono. Gravas, ke, verkante, vi konsultas vortarojn, enciklopediojn, pliriĉigas vian vortostokon kaj evoluigas vian skribajn kapablojn, ĉar la verkado apartenas al la aktiva formo de lingvouzado.

2) La samo validas ankaŭ por la dissendolisto de ural-siberiaj esperantistoj. Se vi trovas novaĵojn, ligitan kun Esperanto, aŭ vi povas verki nur kelkajn liniojn pri interesa fakto el via vivo, pri via loka esperantista agado, ne hezitu tion fari. Krome en la dissendolisto eblas komenti mesaĝojn, diskuti problemojn, eĉ disputi pri diversaj temoj. Apenaŭ mi kredas tiujn, kiuj asertas, ke al ili mankas tempo por legi mesaĝojn el la dissendolisto.

3) Mi ankoraŭfoje mencias la aktivadon de uralaj esperantistoj en la retgrupoj VK. Ne sufiĉas nur banale ŝatoklaki kaj per tio vidigi sin en la retgrupo, kvankam ankaŭ tio estas ne malgrava. Pli gravas, se oni verkas proprajn mesaĝojn, afiŝas proprajn tekstojn, fotojn kaj komentojn. Alia ebla varianto de aktivado permesas al ĉiu posedanto de la hejmpaĝo VK krei senpage propran grupon pri konkreta temo en Esperanto, administri ĝin, inviti amikojn al kunlaboro.

Mi ŝatus mencii kelkajn aliajn retrojektojn, kiuj sukcese evoluigas kaj konsciigas esperantistojn. “Esperanto-Sumoo” – internacia konkurso de legantoj en Esperanto. En ĉiu sesio deko da uralaj esperantistoj partoprenas ĝin, kaj Dilara Gadirova kaj Irina Kirina kunlaboras eĉ kiel prizorgantoj de internaciaj grupoj. <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

“Esperanto-poŝtkruciĝo” de MASI (EoPK) <https://bildkarto.weebly.com/> Esperanto-Poŝtkruciĝo invitas vin partopreni interŝanĝon de poŝtkartoj kun esperantistoj el diversaj landoj kaj regionoj. Aliĝu, se plezurigus vin elektadi plaĉan bildkarton kaj surskribi ĝin mane, per simpla skribilo. Kaj poste trovi en via poŝtkesto bildkarton de iu el ie kun amika mesaĝo en Esperanto!

Se vi volas lingve perfektigi vin kaj memkontroli vian sciojn pri esperantologio, Esperanta gramatiko, leksiko kaj literaturo, historio de la esperantista movado, Esperanto-kulturo, ludo “Riskon” ĉe Edukado.net. “Risko” estas tre streĉa sed interesega intelekta ludo, en kiu vi ne ĉiam gajnas, eĉ pli ofte malgajnas, sed la ludo ne iĝas pro tio malpli altira. Ĝi okupas ĉiutage ne pli ol 2-3 minutojn de via valora tempo. Por ludi “Riskon”, vi devas unue aliĝi al Edukado.net. <http://edukado.net/>

Jen estas nur kelkaj retaj projektoj el dekoj kaj centoj, kiujn kreas kaj partoprenas esperantistoj en la tuta mondo. Por ne ekdormi por ĉiam kiel eterna komencanto kaj por ne perdi ligojn kun la esperantista komunumo, vi povas tuj fari unuan paŝon kaj trovi por vi interesan retokupon. Se vi jam partoprenas aliajn interesajn projektojn en-kaj eksterlande kaj ŝatus konigi ilin al uralanoj, bonvolu fari tion replike al ĉi tiu mesaĝo.

*Vladimir Opletajev*

## **Ludoj en la instruado de Esperanto**

En la metodiko de la Esperanto-instruado ĉiam gravas kaj des pli nun, en la epoko de vaste alireblaj modernaj kaj variaj teknikaj rimedoj, aktualas la aplikado de diversaj ludoj en la instruprocezo. Unue, ludoj helpas intensigi kaj akceli la tutan instruon procezon, aktivigante lernantojn (ilian atenton kaj memorkapablon) en diversaj etapoj de la leciono. Due, instruaj lingvaj ludoj proksimigas la interkomunikadon en lecionoj al reala parolpraktiko kaj motivas lernantojn al pli efika kompreno de la Esperanta strukturo kaj al pli rapida kaj senĝena transiro de psikologia parolbariero.

El la vidpunkto de la aplikataj materialoj kaj formoj la instrua lingva ludo estas fakte paroliga situaci-komunika ekzerco, ebliganta multfojan ripetadon de instruata materialo (leksika, gramatika ktp.) en la kondiĉoj maksimume identaj kun la reala komunikado kaj celanta rivelon de emociaj, spontaneaj, aŭtentaj kaj adekvataj parolreagoj fare de lernantoj.

Instruaj ludoj en la leciono de Esperanto rolas kiel grava metodika ilo, preparanta lernantojn al memstara parolado kaj efike evoluiganta iliajn parolkapablojn.

Oni povas trovi tre multajn klasifikojn de instruaj lingvaj ludoj. Ilia tipologio dependas de la bazaj kriterioj submetataj al diversaj grupoj de ludoj. Se kiel kriterioj unuarangas celo kaj enhavo de ludoj, ili povas esti lingvaj, paroligaj kaj interkomunikaj. Se oni konsideras nur ilian organizan formon, oni distingas ludojn objektajn, movajn, situaciajn, rolajn, konkursajn, intelektajn, komunikajn, interagajn. El la vidpunkto de la organiza procedo ekzistas ludoj komputilaj, skribaj, buŝaj, ludoj kun kaj sen apogoj, simul-imitaj, kreaj ktp. Depende de la nombro de ludantoj distingiĝas ludoj individuaj, partneraj, teamaj, tutgrupaj.

Se instruistoj kapablas lerte apliki ludojn instrucele, ili ne nur vigligas sian instruadon, sed ili ankaŭ kreas la reciprokan situacion de sukceso, plialtigas la memfidon de lernantoj en la kondiĉoj de distra kaj amuza kunagado.

*Vladimir Opletajev*

## ***Esperanto-instruistoj de Rusio***

### **Roman Jefremov**

Naskiĝdato: 17. novembro 1985

Jaro de esperantistiĝo: 2008

Loĝloko: Glazovo, Udmurtio

Profesio: inĝeniero-kemiisto

Instruista kvalifiko: Amatora instruanto de Esperanto

La gepatra lingvo: la rusa

Studitaj fremdaj lingvoj: la angla, Esperanto

Preferataj aŭ plejofte aplikataj instrumentoj en la kursoj de Esperanto: gramatika, miksitaj, luda metodoj.

Esperantlingva kvalifiko: KER-ekzameno, C-1, 2012.

Instruspertoj: ĉeestaj kursoj en Glazovo dum 3 jaroj (2010-2013),

Esperanto-lecionoj en Ural-Siberiaj printempaj esperantistaj

renkontiĝoj EsPrimo, Lingvotrejnadoj en Jekaterinburgo, okazigo de intelektaj ludoj dum IJK en Brazilo (2014).



Instruista kredo: kiu volas lerni, tiu lernos eĉ sen kroma instigo. Necesas nur iom helpi fari la lernadon interesa.

Ŝatata aforismo: "Ni ssi" (en la ĉina: "Restu serena kiel floro de lotuso ĉe la pordo de templo de vero")

## Intelektaj ludoj

Intelektaj ludoj estas unika fenomeno, kiu unuigas milojn da homoj el diversaj anguloj de la mondo. La luda movado en Rusio estas multe pli vasta ol ekzemple esperantista movado kaj disvastiĝas tre rapide inter ruslingva loĝantaro de pluraj landoj.

La bazo de tiu movado estas certe sporta varianto de la fama televida ludo "Kio? Kie? Kiam?" ("KKK"). Ĝi diferencas de la televida varianto, ĉar ĝin partoprenas samtempe multaj teamoj, kiuj skribe respondas al la samaj demandoj. Tiu ĉi ludo estas rusia inventaĵo kaj originale estis ludata ruslingve, sed nun oni ludas ĝin jam en pluraj aliaj lingvoj. En la tutmonda ranglisto de la Internacia Asocio de la kluboj "KKK" estas kelkaj miloj da teamoj. Krom ĝi estas vaste uzata la ludo "Brain-ring", kiu similas al "Kio? Kie? Kiam?", sed ĝin partoprenas samtempe nur 2 teamoj, kies celo estas ne nur ĝuste respondi la demandon, sed fari tion pli rapide ol la rivala teamo. Sur la tabloj estas specialaj butonoj, kiujn ludantoj premas por havi ŝancon respondi. Se la respondo malveras, rajtas do respondi la kontraŭa teamo. "KKK" kaj "Brain-ring" estas ĝenerale pensad-ludoj. Komprenible la ludantoj bezonas iun bazan stokon da ĝeneralaj scioj kaj koncernen kulturajn nivelojn, sed la plej grava estas kapablo trovi la bezonatajn informerojn en la demando mem, kunigi, "disvolvi" ĝin, kaj per teama interago dum 1 minuto atingi la veran respondon. Do tio ne estas ludoj pri puraj scioj, kiel oni ofte opinias.

Se temas pri "pursciaj" ludoj, do la plej fama inter ili estas "Ĉies ludo" ("Своя игра"), kiu same devenas de televida programo. En tiu ludo la partoprenantoj kontrolas sian scion de pluraj faktoj kaj konkuras, kiu el ili estas pli bona "vivanta enciklopedio". Ekzistas kelkaj variantoj de tiu ludo – teamaj kaj individuaj, voĉaj kaj skribaj, kaj ili ĉiuj estas uzataj dum intelektaj ĉampionecaj konkursoj. Nuntempe populariĝas ankaŭ diversaj tipoj de "amaskomunikilaj ludoj", kie la taskoj enhavas informojn en bildoj, sonoj kaj video-formatoj. Tiuj ludoj ofte temas pri artaĵoj, muziko, filmoj, kaj ankaŭ ili estas tre ŝatataj de la ludanta publiko.

Ĝenerale intelektaj ludoj estas maniero de lernado kaj akirado de novaj scioj. Tiom grandan kvanton da novaj informoj mi ricevis el neniu alia fonto post kiam mi finis la lernejon. Strebante al plialtigo de lud-nivelo ni ĉiam plialtigas la nivelon kulture kaj lernas ion novan – legas librojn, spektas filmojn, penas forigi "blankajn makulojn" en nia klereco. Do la ludoj certe estas utilaj, evoluigas pens- kaj memor-kapablon, kio estas bezonata kaj por infanoj, kaj por plenkreskuloj.

Krom tio la ludoj havas gravan socian rolon kaj unuigas homojn surbaze de komuna intereso. Tiajn amikojn, kiajn mi trovis per la lud-movado, mi ne povus trovi alimaniere. Teama interago dum la minuto de diskutado kunigas homojn ne malpli ol komuna drinkumado. Jam dum 2 jaroj mi gvidas la urban lud-klubon en Glazov. Ni organizas diverstipajn ludojn por plenkreskuloj kaj infanoj, trejnas nin mem, partoprenas konkursojn en aliaj urboj kaj tutmondajn samtempajn turnirojn.

Poio me aplikas intelektajn ludojn ankaŭ en Esperantujo. Miaj programeroj dum Esperanto-aranĝoj ne estas veraj lecionoj, sed mi esperas, ke la partoprenantoj multon novan ekscias dum ili. Dum uralaj Esperanto-eventoj "EsPrimo" kaj "Aŭtuna lingvotrejnado" jam plurfoje okazis "Kio? Kie? Kiam?" kaj "Brain-ring", ĉi-jare mi provis enkonduki ankaŭ individuajn "Ĉies ludon", kaj laŭ la impresoj de ludintoj ĉio pasis sukcese. Esperantlingvaj ludoj certe havas

ankaŭ lingvan flankon – dum la ludado partoprenantoj evoluigas sian parolkapablon kaj plivastigas vortprovizon.

Interesan sperton mi havis organizante la ludon “Kio? Kie? Kiam?” dum la Internacia Junulara Kongreso en Fortalezo (Brazilo) en 2014. Se ruslingva publiko ĝenerale konas tiun aferon, kaj ĉiu homo almenaŭ unufoje en sia vivo spektis la televid-programon, do por multaj eksterlandanoj tiu fenomeno estis tute nekonata, kaj dum la unua duono de la ludo multaj partoprenantoj nur penis kompreni, kion ja mi volas de ili. Sed iom post iom ĉiuj adaptiĝis, komencis pli vigle diskuti demandojn en la teamoj, kaj en la fino tio jam estis vera intelekta batalo.

Intelektaj ludoj allogas min ankaŭ pro tio, ke ili vidigas homojn tiaj, kiaj ili vere estas. Ĉi tie ne eblas kaŝi propran malsaĝon aŭ nekapablon komunikiĝi malantaŭ graveca aspekto aŭ belsonaj vortoj, kiel tio ofte okazas dum ordinara vivo. Homo luktas kontraŭ sia propra malperfekto kaj verigas la frazon de Sokrato: “Mi scias nur tion, ke mi nenion scias”. Dum la ludo ni transiras de lernado de la mondo al lernado de ni mem kaj ĉiutage strebas esti pli bonaj kaj pli kleraj ol ni estis hieraŭ. Kaj organizante la ludojn mi provas transdoni tiun emon al pluraj homoj. Ĉar poste Sokrato diris: “Aliaj ja eĉ tion ne scias”. ☺

Roman Jefremov

## Lingva festivalo

### Esperanto en la 12-a Moskva lingva festivalo

*La 12-a Moskva Internacia Lingva Festivalo okazis la 10-an de decembro 2017 en la Centro de Pedagogia Majstreco (Moskvo, Ĥamovniĉeskij val, 6). La festivalon organizis Moskva Esperanta Asocio MASI. Estis prezentitaj 60 lingvoj, 20 prilingvistikaj prelegoj, 15 metodikaj prelegoj kaj 10 naci-kulturaj programeroj. Funkciis Infana Spaco. La organizadon kontribuis 37 teamoj kaj dekoj da volontuloj, la programon – 100 prelegantoj. La festivalon vizitis ĉirkaŭ 800 gastoj. La tuta partoprenantaro – ĉirkaŭ 1000 homoj.*

Esperanto ĉiam forte rimarkeblas en MLF. La 12-a ne estis escepto – male, Esperanta temo akiris novajn evoluojn. Dum la Solena Malfermo estis alvoko: “Ĉiu en tiu ĉi salono konscias, ke sen Esperanto la festivalo tutsimple ne okazus – do, ĉiu nepre devas viziti la prezenton de tiu ĉi lingvo!”.

Tiun ĉi fojon la frazo estas pli trafa ol iam antaŭe: la organizan teamon lasis ĉiuj lingvistoj, kaj el 37 ĝiaj membroj 28 estis esperantistoj – eksaj aŭ nunaj MASianoj. La gvidajn rolojn en la organizado havis la MASianoj Aleksandr Basov, Aleksandr Lebedev, Sofja Zareckaja kaj Maksim Silantjev. 10 MASianoj kontribuis al la programo kiel lingvoprezentantoj. Irina Gonĉarova kaj Pjotr Fedosov en plenplenaj klasĉambroj prezentis Esperanton.

La unuan fojon dum la festivalo estis organizita la Infana Spaco, kiu funkciis 8 horojn kun la partopreno de pli ol 30 infanoj. Ĉar zorgis pri ĝi la entuziasma novicino Tatjana Mojnjakova kaj la plej grandan parton de la infana programo gvidis MASianoj (Morgan Malie, Viktorija Prijmak, Jelena Berejkova, Natalja Laziĉ, Pjotr Fedosov, Irina Gonĉarova kaj Tatjana mem) ĝi enhavis multajn erojn pri aŭ eĉ en Esperanto. Inter cetere, tre sukcese pasis la



surskribado de bildkartoj en Esperanto por la Esperanta Poŝtkruciĝo, kiun partoprenis pli ol 20 geknaboj.

Ĉe la Solena Fermo dum la muzika kvizo, kiam necesis diveni, en kiu lingvo estas kantata iu konata kanto, la gvidantoj Kirill Grustnjov kaj Svetlana Ŝiškina (kompreneble, MASianoj) anoncis: “La sekva kanto estas en la plej populara lingvo de tiu ĉi festivalo”, - kaj la tuta salono kriis: “Esperanto!”

*Irina Gončarova,  
Direktoro de MLF*

## **Libroj**



### **Anna Striganova furoras**

En la ĵus aperinta decembra numero de la revuo "Esperanto" aperis la listo de furoraĵoj de la kongresa libroservo en Seulo. Ĉi foje en ĝi aperas eĉ du libretoj de Anna Striganova el la serio "Fabelaj sekretoj": "Fabeloj pri komenco" (2017) kaj "Miraklo de unu momento" (2014).



Ricevi pliajn informojn pri la libretoj kaj akiri ilin (en Rusio) vi povas en la retejo de la eldonejo Impeto: <http://lernolibro.ru/shevchenkostriganova>

*Dima Ŝevčenko*

## **Rusaj amaskomunikiloj pri Esperanto**



### **Por pureco de la lingvo**

15.12.2017 scienc-populariga paĝaro „N + 1“ diskonigis mian artikolon pri tio, kiel Esperanto ŝanĝiĝis, post kiam ĝi iĝis viva planlingvo en reala socia vivo — <https://nplus1.ru/material/2017/12/14/esperanto-changes> (en la rusa lingvo).

La temon elektis la redakcio. Ankaŭ la titolo estas ilia.

Bildoj de diversaj aranĝoj, alŝutitaj antaŭe de aliaj esperantistoj en Vikipedion.

*Slavik Ivanov*



## 60 jaroj en Esperantio

Antaŭ 60 jaroj, la 30-an de novembro 1957, mi komencis lerni Esperanton.

Jen mia tiama foto.

Ekde tiu tempo pasis 60 jaroj de mia tre interesa kaj aktiva vivo en Esperanto-lando.

Antaŭ tri jaroj, okaze de mia 75-jariĝo, Rusia Esperanto-Gazeto, N 4, 2014 publikigis miajn koncizajn rememorojn. Ĉi tie ili estas legeblaj (aŭ relegeblaj) sen fotoj, sed kun referencoj al aliaj retaj publikaĵoj, kiujn vi povas malfermi:

[http://www.esperanto-mv.pp.ru/Cetero/Mia\\_vivo\\_en\\_Esperanto-lando.html](http://www.esperanto-mv.pp.ru/Cetero/Mia_vivo_en_Esperanto-lando.html)

Ĉi tie miaj rememoroj estas legeblaj kun fotoj:

[http://www.esperanto-mv.pp.ru/Cetero/Mia\\_vivo\\_en\\_Esperanto-lando.pdf](http://www.esperanto-mv.pp.ru/Cetero/Mia_vivo_en_Esperanto-lando.pdf)

Jen la versio, kiu pli frue aperis en Panteono de la retejo edukado.net:

<http://www.edukado.net/biblioteko/panteono?iid=94&s=96f6654f97598835e787c1b382965b49>

Jen estas la libreto de Nikolaj Andrejev, per kiu mi lernis Esperanton en la 1957a jaro. Konciza gramatiko, vortareto, eĉ ne unu frazo en Esperanto!

<https://www.ozon.ru/context/detail/id/26352103/>



*Boris Kolker*

## *Evettoj*

### Portu vian lumon kaj kreu: Povilas Jegorovas honorita

La 14an de decembro en la historia Urbodomo de Vilno okazis solena ceremonio organizita de



la Litovia ministerio de kulturo, en kiu la ministro de kulturo Liana Ruokytė-Jonsson enmanigis diversajn premiojn kaj honorigojn de la ministerio al 35 personoj. Inter ili tri personoj ricevis la plej altan distingon de la ministerio – la honorsignon “Nešk savo šviesą ir tikėk” (Portu Vian lumon kaj kreu). Unu el ili estis la prezidanto de la Litova Esperanto-Asocio (LEA) Povilas Jegorovas, kiu ricevis ĝin “pro grava kontribuo kaj grandaj meritoj al la Litovia kulturo, pro inspiraj iniciatoj por

pozitiva agado en la komunumo, pro persona respondeco en kreado de kultura kaj spirita etoso, pro firmigo de kultura dialogo, flegado de nacia konkordo, kreskigo de la humanismaj valoroj en la socio, kaj pro la multjara esperantista agado”.

La ceremonion ĉeestis ankaŭ la vicministro de kulturo Gintautė Žemaitytė. Al la ceremonio estis invititaj pli ol ducent kulturagantoj kaj funkciuloj, inkluzive de la unua vicprezidanto de LEA Audrys Antanaitis, vicprezidanto de LEA Arimantas Raĉkauskas, respondeca sekretario de LEA Irena Alijoŝiūtė, prezidanto de la Vilna Esperanto-Societo Algimantas Piliponis kaj ankoraŭ kvin esperantistoj de Vilno. La ceremonion gvidis la konata litova aktoro Gintaras Mikalauskas. Ĉiu honorito fare de la prezidanto de la kunveno estis prezentita per proksimume duonpaĝa teksto, pri Povilas Jegorovas estis notitaj liaj ĉefaj agadoj en la Esperanto-movado.

Komence de la ceremonio Liana Ruokytė-Jonsson gratulis ĉiujn honoritojn, substrekis la gravecon de iliaj kulturaj agadoj kaj ĝojis pro la riĉa kaj diversflanka kultura vivo en Litovio. Ricevinte la honorsignon, Povilas Jegorovas en sia kelkminuta dankparolado emfazis lingvajn problemojn internacie kaj en la lando kaj diris, ke esperantistoj en ĉi tiuj temoj povas diri siajn tre firmajn vortojn. Laŭ la instigo de la prezidanto de la kunveno, li fine diris kelkajn frazojn en Esperanto, bondezirante okaze de la proksimiĝantaj Kristnasko kaj Novjарfesto al ĉiuj, kio ege vigligis la plenan salondon da ĉeestantoj.

Dum paŭzoj en la sufiĉe longa ceremonio tre bele kaj bonhumore kantis la fama junulara koruso “Kivi”. Partoprenis multaj ĵurnalistoj kaj fotistoj. Krom multaj fotoj dum la premio fine estis farita komuna foto de ĉiuj premiitoj kun la ministro de kulturo. La ceremonion kronis abunda akcepto de la ministro. Pri la evento vaste informis diversaj amaskomunikiloj de Litovio, ankaŭ lla ĉefa vespera novaĵprogramo de la Litovia nacia televido “Panorama” kaj la retejo de la kulturministerio.

Pri la honorigo decidis speciala naŭpersona ministeria komisiono, en kiu estas tri vicministroj kaj kelkaj aliaj altrangaj funkciuloj de la ministerio. La rekomendon atribui al Povilas Jegorovas la honorsignon “Portu Vian lumon kaj kredu” faris la prezidanto de la parlamenta komitato pri kulturo Ramūnas Karbauskis. Povilas Jegorovas ricevis honorsignon №40. Tio signifas, ke ekde 1990 ĝis nun nur 40 homoj ricevis ĉi tiun altan distingon.

*Novajretejo La Balta Ondo:* <http://sezonoj.ru/2017/12/litovio-25/>

## La Kuriero en Esperanto aprezata

En kunsido en la sidejo de Unesko en Parizo la 12an de decembro, la ĉefredaktoro de la Unesko-Kuriero bonvenigis la ekaperon de Esperanta versio aldone al la ekzistanta familio — la franca, angla, araba, ĉina, hispana, portugala kaj rusa. La kunsido estis konceptita por 10-minuta daŭro, sed la bonvenigo de la esperantistoj estis tiom pozitiva, ke ĝi daŭris 70 minutojn, kun la trakto de tre praktikaj demandoj kaj respondoj. La akceptanta ĉefredaktorino estas s-ino Jasmina Ŝipova, origine el Makedonio, sed en la redaktora posteno jam de 1983. Ŝia nove enpostenigita asistanto estas s-ino Xiaorong Chen el Ĉinio. Ĉe la esperantistoj estis Trezoro Huang Yinbao, la filino Huang Xiaojuan, François Lo Jacomo, kaj reprezente de UEA, Stefan MacGill.

Refreŝigata per jasmena teo el Ĉinio, ni trairis la 5-punktan tagordon:

**1. Kontrakto:** Klarigite la proceduro por pretigi kaj akceptigi kontrakton inter Unesko kaj la produktanto de la numeroj, la firmao Ora Ponto. Tio suplementas kontrakton la antaŭan tagon subskribitan inter Ora Ponto kaj UEA (vidu foton en la PDF).

**2. Rapidigo:** Akiro de la fontotekstoj pli frue, por rapidigi la grandan traduklaboron kaj per tio limigi la postreston de la aperigo de la E-versio kompare al la aliaj.

**3. Reklamoj:** La rajto aperigi en la kuriero reklamojn aŭ agnoskojn de sponsoroj, ĉefe el Ĉinio, estas konfirmata, laŭ kondiĉoj precizigendaj en la planata kontrakto. Tiu eblo povos firmigi la financon bazon de la E-versio.

**4. Retejo:** Konfirmo pri la eblo konigi en la elŝuta hejmpaĝo de la Kuriero pri la aperigado de versio en Esperanto, eĉ se la numeroj aperas pli malfrue en Eo kompare kun aliaj lingvoj.

**5. Invito de sugestoj, kiel Ora Ponto povos labori pli helpeme.** Venis malmulto da gravaĵoj, ĉefe laŭdoj. Diskutite la bezonojn liveri kvinon da Kurieroj al Unesko, por la arkivo, la biblioteko, la redakcio kaj la Ĝenerala Direktoro, kaj foje por ekspozicioj. Ankaŭ menciite la planoj por la Kuriero en la 103a Universala Kongreso en Lisbono.

Entute tre bonetosa, foje kvarlingva renkontiĝo kun tre pozitivaj rezultoj.

Raportis: SMG.

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>[gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉesto en la ekspedolistoj.

*Stefan MacGill, Vicprezidanto de UEA*

## Alvoko

**Ekde 2018 jaro REU lanĉas kulturalan kaj beletran suplementon al sia Bulteno (la titolo ankoraŭ ne estas difinita). Tial ni petas ĉiujn verkemulojn – poetojn, prozistojn, tradukistojn, literaturajn kritikistojn, esperantologojn kaj verkistojn de scienc-popularaj tekstoj – sendi siajn eventualajn kontribuojn al la adreso [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru).**

**La solaj kaŭzoj por rifuzo de publikigo de la verkoj povas esti 1) troa grandeco (romanon, eĉ genian, ni publikigi ne povos); 2) malalta lingva nivelo (korekti tro da gramatikaj eraroj estas ekster niaj eblecoj) kaj 3) verkoj kun nekomprenebla aŭ tro malbela stilo. Ĉio cetera aperos sen cenzuro (sed ne sen literatura redaktado!).**

**La suplementon aŭtomate ricevados ĉiuj membroj de REU, kiuj ricevas REU-bulnenon sen iu ajn aldona pago.**

*Estraro de REU*

## **KOTIZOJ de REU por 2018**

*Laŭ Decido de la Estraro de REU de 25.10.2017*

***Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj kun samaj rajtoj krom voĉdonrajto. Por iĝi membro de REU necesas nepre plenigi kaj sendi aliĝilon <http://reu.ru/aligho/eo> kaj pagi koncernan membran kotizon.***

1. Individua kotizo – 250 rub. (por ekster-KŜŜ-anoj – 20 eŭroj). La individua membro ricevas elektronikforme membrokarton, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn (laŭpete REU sendas la materialojn ankaŭ per ordinara poŝto), voĉdonrajton dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.

2. Dumviva kotizo - 20-oblo de la individua kotizo. La dumviva membro ricevas ĉion saman kiel la individua membro dum la tuta vivo.

3. Mecenata kotizo – ne malpli ol 2-oblo de la individua kotizo. La mecenato ricevas ĉion saman kiel la individua membro plus danka mencio en la Bulteno kaj en la asocia retejo [reu.ru](http://reu.ru).

4. Kolektiva kotizo - 200 rubloj por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj). La aliĝinta kolektivo ricevas membrokartojn (elektronikforme) por siaj aligitaj membroj, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn, voĉdonrajton por siaj aligitaj membroj dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.

5. Aliĝkotizo por nova aliĝinta kolektivo, aŭ okaze de realiĝo – 300 rubloj. Unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas. Nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.

Amiko de REU – senpage. Amikoj de REU ricevas rajton partopreni en REU-Konferenco sen voĉdonrajto, Bultenon de REU en elektronika formo kaj aliajn informojn. Persono, sin anoncanta "amiko de REU", devas plenigi aliĝilon kaj menciisian ekzistantan retadreson.

## PAGMANIEROJ

1. Per Sberbank. Al la banka karto **5469 3800 7074 4643**. Tion eblas fari senpere en bankoficejo, per Sberbank-Online, per bankaŭtomato kaj terminalo. <http://sberbank-sbrf.ru/karta-sberbanka/kak-perevesti-dengi-na-kartu-sberbanka-rossii.html>
2. Per Yandex-Denĝi povas pagi al la monujo **41001363815184**, pagmanierojn vidu: <http://money.yandex.ru/prepaid/>
3. Pagi kotizon (post anticipa interkonsento) ankaŭ oni povas persone en Moskvo.
4. Per UEA-konto reua-p (precipe por eŭraj kotizoj).

Bonvolu nepre konsideri, ke samtage kun la ĝiro **vi devas** retroŝte aŭ telefone **informi pri via pago** la kasiston (Aleksandr Lebedev, [amikko@yandex.ru](mailto:amikko@yandex.ru), telefonnumero 89853852181). Vi devas informi pri ĝirita sumo kaj nomo(j) de homo(j), por kiu(j) estas destinita la pago. Se vi ne informos nin, **la mono estos konsiderata kiel anonima donaco por la kaso!**



---

**Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo  
"RUSIA ESPERANTISTA UNIO"**

BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) aŭ (kaj) Svetlana Smetanina [svsmetanina@yandex.ru](mailto:svsmetanina@yandex.ru)

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*